

KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Jaro 43-a BRAZILO, JULIO-AŬGUSTO-SEPTEMBRO 2019 2019 N-ro 175

“Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”
JESUO (*Mt*, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo*.
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian.”
ZAMENHOF. *La Espero*.

FRATECA PETO

Helpu per via preĝo ĉiujn viajn fratojn:
kiuj neniam trovas tempon aŭ rimedojn por esti utila al iu;
kiuj sin sentas ĉie vundataj de aliula maldankemo;
kiuj vindas al si la okulojn per nigra tolaĵo, por vidi malbonon en ĉiaj situacioj;
kiuj rigardadas mil kastelojn en la aero, sed ne ekbruligas eĉ unu kandelon sur la tero;
kiuj nur laboras en la ebura turo de sia persona kulto, ne malsuprenirante

ĝiajn ŝtupojn por kunlabori kun la ceteraj;
kiuj sin kredas specialaj senditoj kaj kreditoroj je privilegioj;
kiuj konsumas altvaloran tempon de la aŭdantoj, parolante ekskluzive pri si mem;
kiuj rezignas lernadi plu en la homa lukto;
kiuj gardadas pardonpeton por ĉiuj siaj kulpoj;
kiuj pretendas la rolon de korifeoj en la mondumo;

kiuj sin opinias nepraj centroj de la ĝenerala intereso;
kiuj sisteme kultas malsanon kaj malhelpadon kontraŭ ĉio.
Ili estas suferantoj de grava malsano, bezonantaj la Silentan Helpon.

El la libro *Kristana agendo*
Spirito: Andreo Ludoviko

Mediumo: Francisco Cândido Xavier

El la portugala lingvo tradukis: A. K. Afonso Costa

Jen nova eldono de Brazila Spiritisma Federacio kaj Eldonejo Lorenz: *Laboristoj de la eterna vivo* (La vivo en la spirita mondo), de la Spirito André Luiz, per la mediumeco de Francisco Cândido Xavier, tradukita de la brazila samideano Paulo Sérgio Viana. Se la eksterbrazilaj samideanoj ĝin volos ricevi, tute senpage, petu, kaj ne sen granda ĝojo ĉi-mirindan verkon ni sendos al vi: editora_lorenz@uol.com.br.



NOVA RETEJO POR LERNANTOJ

Anna Lowenstein
anna.lowenstein@esperanto.org

Ĉu vi aŭdis pri la nova facillingva retejo de UEA kreita por lernantoj? Ĝi allireblas per <https://uea.facila.org/>.

La artikoloj konsistas ĉefe el novaĵoj kaj informoj pri Esperanto-movado, sed estas ankaŭ ĝeneralaj legaĵoj, facillingvaj filmetoj, kalendaro de estontaj eventoj kaj aliaj. Estas grave, ke la legantoj ne nur pasive legu, sed sentu sin parto de la afero, do ili havas eblecon komenti sub la artikoloj, prezenti sin en la paĝo “Niaj legantoj”, kaj sendi mallongajn raportojn kaj fotojn pri lokaj agadoj.

La facila lingvaĵo de la artikoloj estas bazita sur la iama vortlisto de Kontakto, nun reviziita. Aldonitaj vortoj rilatas plejparte al komputado kaj Interreto, dum estis forigitaj kelkaj vortoj, kiuj ne ofte estas bezonataj en tia retejo. La reviziita vortlisto troviĝas ĉe: <https://uea.facila.org/vortlisto/>.

Ĉiuj artikoloj estas mallongaj kun ne pli ol 400 vortoj. Lernantoj ne volas legi longajn artikolojn! Nur la rubriko “Legajoj” rajtas akcepti iom pli longajn artikolojn, ĝis maksimume 600 vortoj.

Kiel redaktoro mi bonvenigos kontribuojn por la retejo. Se estas malfacile por vi verki facile, ne maltrankviliĝu: mi mem volonte redaktos kaj simpligos artikolojn senditajn por uea.facila. Mi ĉiam tamen petos aprobon de la verkinto antaŭ ol aperigi redaktitan artikolon sub ties nomo.

LORENZ

“KOMUNIKOJ”

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 43-a – n-ro 175 | Julio-Aŭgusto-Septembro 2019

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz
Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal
21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)
Telefonaĵoj: ☎ + 55-21-2221-2269 - ☎ + 55-21-2450-4768
Skajpo: Lorenz.Editora | Fejsbuko: [Editora Lorenz](https://www.facebook.com/Editora.Lorenz) | Retadreso: editora_lorenz@uol.com.br
Retpaĝo: <http://editorialorenz.blogspot.com.br>

HIRUNDETOJ

Abel Gomes

Hirundetoj, mi rigardis
lam vin, ha, kun envi',
Ke vi bone flugi povis,
Kaj ne povis flugi mi.

Mi diradis sur la tero:
“Mi kontente flugus for,
Flugus mi viziti iun,
Kaj ekĝojos mia kor’.”

Mi deziris ke mi povu
En l' aero levi min,
Kaj pro ia flugebleco
Tiam mi enviis vin.

Sed postmorte mi eklernis
Flugi ĉien laŭ dezir',
Pli rapide eĉ ol vi mem,
En leviĝ', en subenir'.

Hirundetoj, nun mi pensas
Pri birdflugo sen envi';
Nun mi ankaŭ povas flugi,
Kaj pli bone eĉ ol vi.

Reformador, Apr. 1946, p. 89
Kunlaboris: Aymoré Vaz Pinto

Eldonejo Lorenz estas la verda heroldo, kiu anoncas al la homoj de la tuta globo fratecajn mesaĝojn de amo kaj paco, harmonie kun homaranismo kaj la interna ideo de Esperanto.

Benedicto Silva



Kompostita de Rogério Mota

RAPORTO PRI LA 104^a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

João Silva dos Santos

UEA okazigis la 104-an Universalan Kongreson de Esperanto en Lahtio, Finnlando, de la 20-a ĝis la 27-a de julio de tiu ĉi jaro.

Al tiu kongreso venis pli ol 900 e-istoj el 57 landoj. La landoj kun plej granda nombro da kongresanoj estis Belgio, Brazilo, Ĉinio, Finnlando, Francio, Germanio, Japanio kaj Korea Respubliko. El dek landoj venis nur unu kongresano.

La temo de la kongreso estis “Vivanta naturo – floranta kulturo” kio estis disvolvita per pluraj prelegoj. Lahtio estos proklamita la Verda Ĉefurbo de Eŭropo por la jaro 2021.

Dum tiu ĉi kongreso UEA elektis kiel ĝia nova prezidanto S-ro Duncan Charters, el Usono, kaj Vicprezidantoj S-ro Fernando Jorge Pedrosa Maia, el Brazilo kaj S-ro Huang Yinbao, el Koreio.

Asocio Lorenz prezentis rondan tablon pri la temo spiriteco.

La temo estis elektita de la estraro de Asocio Lorenz, pro ĝia nuntempa graveco. Brazila sciencisto estis premiita per laboro farita pri tiu afero. Usonaj universitatoj starigis tiun lernadon en la fakultatoj de medicino. Du universitatoj en Rio-de-Ĵaneiro ankaŭ starigis tiun instruon al la estontaj kuracistoj, plibonigante per tiu rimedo, la kuracadon, kiu certe iĝos pli kompleta kaj per malpli malbonaj efikoj.

S-ro Robinson Mattos, prezidanto de la Asocio Lorenz, malfermis la kunsidon salutante kaj bonvenigante la gekongresanojn. Sinjorinoj Terezinha kaj Joana helpis dum la evento.

La prelego okazis per bona etoso kaj kelkaj kongresanoj faris demandojn.

La prelegantoj estis D-ro Elmir Lima kiu prelegis pri spiriteco laŭ spiritisma vidpunkto kaj D-ro João Silva dos Santos prelegis pri spiriteco laŭ scienca vidpunkto. Al la prelego ĉeestis ĉirkaŭ tridek da personoj el deko da landoj.



KUNLABORU! – Membrigu ĉe ASOCIO LORENZ kaj helpu la disvastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!

COLABORE! – Torne-se membro da ASSOCIAÇÃO LORENZ e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!

SENPAĜAJ LIBROJ...

Ĉiuj kiuj loĝas ekster Brazilo rajtas ricevi niajn librojn, en Esperanto, tute senpage. Sufiĉas nur sendi vian kompletan nomon kaj poŝtadreson al editora_lorenz@uol.com.br

Ĉi tie ni rememoras kelkajn konceptojn diritajn dum la prelego:

Kio estas spiriteco? Laŭ la kompreno de William James (usonana filozofa, 1842-1910): “Spiriteco estas la plej alta sento, la plej nobla, kio kunigas la kreitaĵon al la Kreinto. Ĝi estas uzata vorto sen kunligoj al formala religio.”

Aliaj konceptoj:

- estas la celo de la estulo por transiri la materian dimension;
- estas la serĉado de signifo por la vivo per konceptoj, kiuj transcendas la tuŝeblan, serĉante ion kunligante al io pli granda ol si mem;
- estas la kredo, ke la vivo sin rilatas al io krom la materio...
- estas ĉio kunliganta al Supera Estulo.
- estas la dinamika dimensio de la ekzistado, kiu pelas la homan estulon per siaj konoj kaj elektoj.

Kiel ekzemplo de spiritecaj homoj, inter aliaj, ni citis Zamenhof (vidu Homaranismon kaj la preĝon).

Al vi, ho potenca senkorpa mistero,
Fortego, la mondon reganta,
Al Vi, granda fonto de l’amo kaj vero
Kaj fonto de vivo konstanta,
Al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,
Sed ĉiuj egale en koro Vin sentas,
Al Vi kiu kreas, al Vi, kiu reĝas,
Hodiaŭ ni preĝas.

“Ĉiu kiu sin dediĉas al studado de la scienco konvinkiĝas, ke malantaŭ la leĝoj de la Universo manifestiĝas Spirito tre supera al la viro, kaj, antaŭ Li, ni, kun niaj limigitaj povoj, devas humiliĝi.” (Albert Einstein)

Estas mirinda afero kune kongresi parolantoj de malsamaj lingvoj sen bezono de interpretisto, evitante la ne-taŭgan samtempan tradukon! Nur Esperanto kapablas fari tion, jam pruvita dum 104 Universalaj Kongresoj kaj aliaj centoj da naciaj, regionaj kaj lokaj eventoj!

Vivu Esperanto!

Kuriozaĵoj el la leteroj de Zamenhof



Al s-ro A. F. en Saratov

En la traduko de la rusa nacia himno la esprimo “estu timata” estas uzita tute bone kaj regule. En la rusa lingvo la vorto “timi” ne havas pasivon, sed tio ĉi ja tute ne montras ankoraŭ ke ankaŭ en Esperanto ĝi ne devas havi pasivon. En ĉiu vivanta lingvo estas permesita uzi nur tiujn formojn, kiujn aliaj personoj jam uzis antaŭ Vi; sed en la lingvo internacia oni devas obei sole nur la logikon. La logiko diras, ke ĉia verbo povas havi pasivon, se nur la senco ĝin permesas. Sed en la verbo “timi” la senco tute bone permesas pasivon, kiel en aliaj verboj. Ĉe la timado ni havas ĉiam du permesojn aŭ objektojn: unu, kiu timas, kaj unu, kiun oni timas, aŭ kiu estas timata. “De l’ malamikoj Vi estu timata” signifas: ke la malamikoj timu Vin (je Vi aŭ antaŭ Vi). Vere ke en la rusa lingvo oni diras ne “timi” de li”, sed tio ĝi estas aparteco de la rusa lingvo, kiu tute ne estas deviga ankaŭ por ĉia alia lingvo. Jam la senco mem permesas tute bone uzi la verbon “timi” kun la akuzativo (en tia maniero ĝin ankaŭ estas uzata en multaj lingvoj, kie ĝi tiel ankaŭ havas pasivon); sed se la senco ĝin ankaŭ ne dirus, ĝin diras ja tute klare nia gramatiko, laŭ kiu en ĉia duba okazo oni povas uzi la prepozicion, “je” aŭ la akuzativon sen prepozicio. Eĉ de vortoj, kiuj per si mem ne postulas la akuzativon. Vi povas en nia lingvo libere ĉiam fari pasivon, se nur la senco de tiu ĉi pasivo estos komprenebla. Tiel ekzemple en la versaĵo “Al la Esperantisto” estas ne malregule uzita la esprimo “la celo estos alvenita (= oni alvenos al la celo). Tiel Vi vidas, ke la amikoj el Moskvo esprimis sian penson tute bone kaj tute ne malpatriote.

L. Z-f.

(Fonto: Iom Reviziita Plena Verkaro de L. L. Zamenhof. Originalaro 1. Unua etapo de Esperanto – 1878-1895. Eldonejo Ludovikito, 1989.)

ROMIA IMPERiestRO REenkARNIĝIS EN BRAZILo

Eurípedes Alves Barbosa - Brazilo

La romia imperiestro Marco Aurélio Antonino Bassiano, alnomata Caracala (Karakala), naskiĝis en Galio (nuntempa Liono, Francio) en la jaro 186, kaj mortis la 4-an de aprilo de la jaro 217-a post Kristo.

Li regnis Romion de la 4-a de februaro 211 ĝis la 8-a de februaro 217. Per la Edikto de Caracala, en 212, tiu imperiestro donis civitanecon al ĉiuj vasaloj de la Imperio por kolekti pli da impostoj. Li konstruis grandajn termojn (banejon) en Romo inter 212 kaj 217, konatajn kiel la termojn de Caracala. Ili estis grandegaj kaj solidaj konstruaĵoj, kie ĉio elspiris lukson kaj komforton. En la interno de la termoj eblis grupiĝi pli ol 1500 homoj.

En la libro "Ave, Cristo", medieme ricevita de Chico Xavier, la spirito Emanuelo informas, ke en lastaj tagoj de la vivo de Caracala, okazis en Romo multe da krimoj kaj suferoj. Li apogis la persekutadon kontraŭ la nazaretoj kaj dignaj civitanoj, kiuj ne aprobis lian malbonan konduton. Li permesis kruelan persekutadon kontraŭ plebanoj kaj sklavoj, kiuj estis kristanoj. Li ordonis la mortigon de sia propra edzino.

Tiu spirito renaskiĝis la 15an de aŭgusto 1899, en São Domingos da Prata-MG, Brazilo, kaj ricevis la nomon Joaquim Rolla. Li faris nur la elementan kurson, sed li havis fortan inklinon al komerca afero. Li estis tre entreprenema homo. Poste, li starigis turismajn kaj vetludajn entreprenojn. Joaquim Rolla fariĝis mastro de pluraj firmaoj, nome Kazino Urca, Kazino de Poços de Caldas, Granda Hotelo de Araxá kaj Kazino Pampulha, inter aliaj.

Li fondis en Belorizonto la gazeton "Folha da Noite", en 1929. Li starigis ankaŭ en Belorizonto la konstruaĵon Governador Juscelino Kubitschek, kiu estas 120 metrojn alta. La arkitektura projekto estis farita de Oscar Niemeyer, en 1952. Li starigis en Rio-de-Janeiro la grandan konstruaĵon "Pavilhão de São

Cristóvão", kaj, en Petrópolis, li konstruigis la faman kaj luksan "Hotel Quitandinha".

En 1946, liaj negocoj travivis egan krizon. Ĉefe pro la malpermeso de vetludoj en Brazilo. Li havis ankaŭ gravajn familiajn problemojn. En tiu jaro, li konatiĝis kun la medio Chico Xavier pere de la esperantisto Ismael Gomes Braga. Joaquim Rolla estis nevo de Maria Rolla, edzino de Ismael. En la "Kazino Urca", Ismael oficis kiel librotenisto. Ismael kaj Joaquim estis grandaj amikoj.

La atestimata kaj respektata medio Chico Xavier (Ŝiko Ŝavier) atestis la reenkarniĝon de Caracala kiel Joaquim Rolla en leteroj senditaj al la tiama prezidanto de Brazila Spiritisma Federacio, Wantuil de Freitas. En sia verko "Testemunhos de Chico Xavier" (Atestoj de Ŝiko Ŝavier), Suely Caldas Schubert pritraktas la aferon.

En la korespondaĵo de 25.11.1948, Chico diras klare, ke li ne havas dubon: Joaquim Rolla estas Caracala reenkarniĝinta, laŭ informoj de amikoj de la spirita mondo.

Post la konatiĝo kun Chico Xavier, Joaquim Rolla ekkredis je la vivo en la transmondo. Li fariĝis bonfara homo kaj de tiam li komencis finance apogi instituciojn, kies celoj estis helpi la necesbezonantojn.

Caracala aŭ Joaquim Rolla estas, kiel ni, eterna ulo, kiu, tra la jarmiloj, jam portis diversajn korpojn kaj uzis plurajn nomojn.



Caracala



Joaquim Rolla

Ruinoj de la termoj de Caracala

APELO

Oh! Eu quero viver! Por favor, permita!
Sou um ser humano em gestação,
Faça a gestação de mim mesmo
Dentro de você...

Quero ser você, você foi eu!
Vives ao redor de mim,
E eu, dentro de você.

Sou muito grato pela minha existência
e conforto,
Pela minha proteção e alimento.
Ainda vou respirar, é cedo ainda,
Ainda vou caminhar, brincar, falar...

Argumentar, trabalhar, servir,
Amar e proteger meus pais,
conhecer o mundo, onde há sol, flores e vento...

Aqui é tão escuro... mas tão aconchegante!
Mas sei que em breve mudarei de lar,
Mas vou crescer, viver, florir,
Mas quero viver... por favor, permita!

Sou semente, semente a germinar,
Terei um nome, talvez até renome...
Ou talvez nem uma simples inscrição cartorial?

Mas, se é hora de partir, que assim se faça,
Para quem ainda nem chegou,
Peço apenas um último desejo:
Quero um túmulo, um luto, e nada mais...

Eu te perdoo e compreendo-te as razões,
Hei de renascer em outro ventre,
Clamando por direito de viver...



PETO

Ho! Mi volas vivi! Bonvolu permesi!
Mi embriiĝas,
Mi kvazaŭ generas min mem
Interne de vi...

Mi volas vivi!
Vi vivas ĉirkaŭ mi,
Kaj mi, interne de vi.

Mi vin tre dankas pro mia ekzisto
kaj komforto,
Pro via ŝirmado kaj nutrado.
Mi ankoraŭ spiros, ankoraŭ fruas,
Mi ankoraŭ piedpaŝos, ludos, parolos...

Argumentos, laboros, servos,
Amos kaj protektos miajn gepatrojn,
Mi ekkonos la mondon, kie estas
suno, floroj kaj vento...

Ĉi tie estas tiom malhele...
sed tiom korvarme!
Sed mi bone scias, ke baldaŭ
mi alihejmiĝos,
Tiam mi kreskos, vivos, ekfloros,
Sed mi volas vivi... bonvolu permesi!

Mi estas ekĝermanta semo,
Mi havos nomon, eble eĉ famecon...
Aŭ eble nek simplan notarian
registriĝon?

Sed se forlasi devas mi,
ankoraŭ ne alveninta,
Kion fari? Tiel estu!!!
Mi prezentas nur unu lastan deziron:
Mi volas tombon, funebron,
nenion plu...

Mi pardonas vin kaj komprenas
viajn motivojn,
Mi renaskiĝos en alia utero,
Pledante verve mian rajton vivi...

POR FAVOR

Oh! ¡Quiero vivir! Por favor permítame!
Soy un ser humano en gestación,
Me estoy produciendo a mi mismo
Dentro de ti...

¡Quiero ser tú, tú eras yo!
Tu vives a mi alrededor,
Y yo, dentro de ti.

Te agradezco mucho por mi existencia
y comodidad,
También por mi refugio y nutrición.
No respiro todavía, todavía es muy temprano,
Más tarde voy a caminar, jugar, hablar...

Argumentar, trabajar, servir,
Amar y proteger a mis padres,
Conoceré el mundo, donde hay sol,
flores y viento...

Aquí es tan oscuro... ¡pero tan acogedor!
Pero bien sé que pronto me cambiaré de hogar,
Pero creceré, viviré, floreceré,
Pero yo quiero vivir... ¡por favor, permítame!

Soy una semilla, una semilla que
se está germinando,
Tendré un nombre, tal vez incluso
un renombre...
¿O tal vez ni una simple inscripción notarial?

Pero si tengo que irme, y no he llegado todavía,
que así sea... que así sea... que así sea...
Presento solo un último deseo:
Quiero una tumba, un luto, nada más...

Te perdono y entiendo tus razones,
Voy a renacer en otro útero,
Afirmando mi derecho a vivir...

